

*Klaus Schubert*

*Universität Hildesheim, Germanio*

## Recenzo de la libro

**Rokicki, Ryszard. 2022. *Enkonduko en la morfologion de Esperanto*. Kaliningrado: Sezonoj / Kaunas: Litova Esperanto-Asocio. (Scio, 11).**

En Esperanto kaŝiĝas pli da reguleco, ol estis difinita per la 16 reguloj (Zamenhof 1887). PAG (Kalocsay kaj Waringhien 1985) kaj PMEG (Wennergren 2023) atestas pri tio. Ryszard Rokicki tezas, ke eĉ tiuj grandaj gramatikoj preteratentas gravajn ecojn de nia lingvo.

Rokicki en la interlingvistiko estas konata nomo. Haveblas aro da esperantologiaj publikaĵoj de li. Plej fama li tamen estas, ĉar en la 1970-aj kaj 1980-aj jaroj li en Varsovio organizis la Interlingvistikajn Seminariojn komence nomitajn Studentaj kaj poste Sciencaj. Nun Rokicki publikigis 88-paĝan libron, ĉefe pri vortfarado, temo vaste debatita kaj debatata. La vortfara sistemo ja estas kerno de la lingvosistemo de Esperanto kaj grava argumento por la asertata facileco.

Morfologio studas la strukturon de vortoj. Ĝi havas du perspektivojn. Sinteze ĝi klarigas, laŭ kiuj reguloj oni povas kombini morfemojn por konstrui kompleksajn vortojn. Analize ĝi klarigas, kiel eblas konstati la signifon de kompleksa vorto elirante de la signifoj de la unuopaj morfemoj.

La faktoro, kiu pleje distingas la analizon de Rokicki de tiuj de pli fruaj aŭtoroj, estas ĝia fokuso al la analiza, la semantika flanko. Grava plia distingilo estas lia esenca tezo, ke en Esperanto ofte ekzistas du aŭ pli da samsonaj morfemoj kun malsama baza signifero, ekzemple STAMP[1], kiu ligiĝas kun la finaĵo *-i* kaj proksimume signifas ‘fari markon’, kaj STAMP[2], kiu ligiĝas kun la finaĵo *-o* kaj signifas ‘marko’.

Tiu klarigo kun du morfemoj STAMP kontrastas kun la tradicia analizo, en kiu ekzistas unusola morfemo STAMP kun verba karaktero, el kiu oni ricevas la vortojn *stampo*, *stampa* ktp. per kunmeto kun finajaj morfemoj, tiel ke ekzemple la aldonita *-o* per morfemefiko donas al la tuta vorto substantivan signifon. La tradicia teorio de vortfarado en Esperanto baziĝas sur la ideo de Émile Boirac el 1907 (Couturat kaj Leau 1907, 18) pri kategoria signifero

en la morfemoj, ofte nomata la gramatika karaktero de la radikoj. La teorion plej grave ellaboris René de Saussure (1914 kaj aliaj publikaĵoj). Kálmán Kalocsay aldone trovis la semantikan mekanismon, kiun li nomis vortefiko (Kalocsay 1931/1970, 3–48) kaj kiun per nuntempa termino ni prefere nomu morfemefiko. Version de tiu teorio aprobis la Akademio de Esperanto (1967/2007, 49–59) kaj ĝin spegulas PIV (Waringhien ĉefred. 1970/2020) kaj PAG (Kalocsay kaj Waringhien 1985, 371–528).<sup>1</sup>

Se en semantika studo oni deziras esprimi signifojn, grava demando estas, kiel fari tion alie ol per la vorto mem. Vortaroj uzas difinojn, Rokicki iom pli malstrikte parolas pri parafrazo. Li distingas sintaksajn de leksikaj parafrazoj. Klarigite per miaj vortoj, la sintaksaj metas la morfemojn de kompleksa vorto en sintagmon enhavantan la vorton de la baza signifo, ekz. (klarigante la kunmeton *ost'a*) *osta malsano* → *malsano de ost*. La leksikaj aldonas pliajn vortojn por modifi la signifon de la bazaj morfemoj, ekz. *fiŝi* → *kapti fiŝojn*. Laŭ mia kompreno tio pli-malpli egalas al tio, kion la ĝenerala morfologio nomas kunmetado kaj derivado, sed Rokicki uzas ĉi tiujn terminojn alimaniere. La tradicia analizo emfazas, ke Esperanto uzas plej grandparte kunmetadon kaj nur tre malofte derivadon. Rokicki multe pli ofte uzas la etiketon derivado. Li tion ne motivas, sed oni eble povus trovi klarigon en la observo, ke multaj el la kunmetaĵoj, precipe tiuj kun sufiksoidoj, en la fakta lingvouzo havas signifon pli specifan ol en pura kunmeto (Dasgupta 1993): ekzemple ni uzas la vorton *lernejo* ne por ajna loko por lerni, sed por lerninstitucio frekventata de infanoj aŭ junuloj.<sup>2</sup>

Rokicki malakceptas la tezon pri la gramatika karaktero nomante ĝin “mistrafa”, tiel ke ni rajtas atendi de li pli trafan kaj eble eĉ pli elegantan teorion klarigon de la lingvaj faktoj observeblaj en esperanta lingvouzo. Por tio lia ĉefa instrumento estas la “monosemia morfemdifino”, do la analizo, laŭ kiu *STAMP*[1] kaj *STAMP*[2] estas du apartaj morfemoj, ĉiu kun nur unusola signifo. Poste ni lernas pri “semantika prototipeco kaj marĝeneco de radikoj”, la “sintaksa genro” de radikoj kaj la “distingo inter primar- kaj sekundarfunkciaj vortformoj”.

Laŭ mia kompreno semantike prototipaj estas morfemoj, kiuj aperas en vortformo paralela al ilia gramatika karaktero (*stampi*), dum marĝenaj estas tiuj, kiuj aperas en pluformita vorto (*stampo*). Samaj faktoj – alia klarigo. Ĉu pli trafe?

Sed mi ne nur plendu. La teorio de Rokicki bone kaptas la fakton, ke en kelkaj morfemoj la lingvouzo ŝanceliĝas inter malsamaj gramatikaj karak-

1 Vidu krome Schubert (1989, 1993, 2015), Wennergren (2023, 557–580).

2 Rokicki ankaŭ ne traktas la interesan fakton, ke oni povas malfari tiun specialiĝon de la signifo enmetante la substantivan finaĵon, do skribante *lernoejo*, kio ĝuste signifas ajnan lokon por lerni (Schubert 1993, 340).

teroj. Ekzemple *komplik'*, laŭ PIV verbkaraktera, estas uzata kaj verbe kaj substantive/adjektive. Tion PIV implice agnoskas klarigante, ke *kompliko* estas “Malfacileco de problemo ...”, dum ĉe strikte verbkaraktera morfemo ĝi devus signifi “malfaciligado de problemo”. Tiajn kazojn Rokicki solvas pli elegante.

La libro ne estas tio, kion ĝia titolo promesas: ĝi ne estas enkonduko. Sed ĝi prezentas interesan analizon de la esperanta morfologio. Rokicki plurloke kritikis Saussure kaj Kalocsay, sed krom PAG eĉ ne citas aŭ referencas iliajn ĉi-temajn verkojn. Kontraste al pli fruaj aŭtoroj Rokicki deziras bazi sian analizon sur nuntempaj lingvistikaj metodoj – sed li referencas al neniu verko el la abunda neesperantologia lingvistika esplorado pri morfologio kaj li aplikas neniun tie trovitan metodon.

Eble estas tro detaleme, se oni kreas apartan morfemon por ĉiu alienhava signifero. Eble oni relegu Wilhelm von Humboldt (1836, 106), kiu pri la homa lingvo skribis: “Sie muß daher von endlichen Mitteln einen unendlichen Gebrauch machen ...” (Ĝi do devas senlime uzi limigitajn rimedojn ...), alivorte, ĉar la lingvo nur havas limigitan kvanton da distingiloj, sed oni per ĝi deziras esprimi senliman kvanton da signifaj nuancoj, oni permesu certan varieblon de signifo kiel ekzemple malplilarĝigon per idiomiĝo kaj plilarĝigon per metafora uzo.

Resume mi diagnozas, ke Ryszard Rokicki kun profunda analizo kaj kun fajna observemo trapensis nian lingvon kaj prezentas iom komplikitan, neniel revolucian, sed ja tre interesan analizon (v.a. Lindstedt 2023).

## Bibliografio

- Akademio de Esperanto. 1967. *Aktoj de la Akademio 1963-1967*. 2-a eld. 2007. Rotterdam: Akademio de Esperanto. (Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto, 9). [https://www.akademio-de-esperanto.org/aktoj/aktoj1/Aktoj\\_de\\_la\\_Akademio\\_1963-1967.pdf](https://www.akademio-de-esperanto.org/aktoj/aktoj1/Aktoj_de_la_Akademio_1963-1967.pdf) (02.04.2024).
- Couturat, Louis kaj Léopold Leau. 1907. *Compte rendu des travaux du Comité (15-24 octobre 1907)*. Coulommiers: Brodard. <http://data.onb.ac.at/dtl/5757216> (02.04.2024).
- Dasgupta, Probal. 1993. “Idiomatycity in Esperanto texts: an empirical study.” *Linguistics* 31: 367–386.
- Humboldt, Wilhelm von (1836): *Über die Verschiedenheit des menschlichen Sprachbaues und ihren Einfluß auf die geistige Entwicklung des Menschengeschlechts*. Berlin: Königliche Akademie der Wissenschaften. <http://data.onb.ac.at/ABO/%2BZ151639107> (02.04.2024).

- Kalocsay, Kálmán. 1931. *Lingvo, stilo, formo*. 3-a eld. 1970. Oosaka: Pirato.
- Kalocsay, Kálmán kaj Gaston Waringhien. 1985. *Plena analiza gramatiko de Esperanto*. 5-a eld. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Lindstedt, Jouko. 2023. "Studo pri vortfarado en Esperanto [Recenzo pri Ryszard Rokicki 2022: Enkonduko en la morfologion de Esperanto]." *Monato kajero* 10: 24–25.
- Saussure, René de. 1914. *La vort-teorio de Esperanto*. Genève: Universala Esperantia Librejo. <http://data.onb.ac.at/dtl/7471765> (02.04.2024).
- Schubert, Klaus. 1989. "An Unplanned Development in Planned Languages. A Study of Word Grammar." En *Interlinguistics: Aspects of the Science of Planned Languages*, redaktis Klaus Schubert kun Dan Maxwell, 249–274. Berlin kaj New York: Mouton de Gruyter. (Trends in Linguistics, Studies and Monographs, 42).
- Schubert, Klaus. 1993. "Semantic Compositionality: Esperanto Word Formation for Language Technology." *Linguistics* 31: 311–365.
- Schubert, Klaus. 2015. "Word-Formation and Planned Languages." En *Word-Formation*, redaktis Peter O. Müller, Ingeborg Ohnheiser, Susan Olsen kaj Franz Rainer, vol. 3, 2210–2225. Berlin kaj Boston: De Gruyter Mouton. (Handbücher zur Sprach- und Kommunikationswissenschaft, 40.3).
- Waringhien, Gaston, ĉefred. 1970. *Plena ilustrita vortaro de Esperanto*. Nova eld. kunordigita de Michel Duc Goninaz kaj K. Roux 2020. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda. <https://vortaro.net> (02.04.2024).
- Wennergren, Bertilo. 2023. *PMEG 2023. Plena manlibro de esperanta gramatiko*. [https://bertilow.com/pmeg/elshutebla/pmeg\\_15.4.pdf](https://bertilow.com/pmeg/elshutebla/pmeg_15.4.pdf) (02.04.2024).
- [Zamenhof, L. L.] D-r Ĝesperanto. 1887. *Meždunarodnyj jazyk*. Varŝava: Kel'ter. <http://data.onb.ac.at/dtl/7001741> (02.04.2024).

## Pri la recenzanto

Klaus Schubert estas emerita profesoro pri aplika lingvistiko en la universitato de Hildesheim (Germanio). Pli frue li laboris kiel socilingvisto, komputa lingvisto, projektestro kaj profesoro pri lingvoteknologio kaj teknika tradukado. Liaj esploraj interesoj koncernas interlingvistikon, tradukologion kaj la teorion de faka komunikado.

Retadreso: [klaus.schubert@uni-hildesheim.de](mailto:klaus.schubert@uni-hildesheim.de)

ORCID-numero: 0000-0002-2684-4303

## **About the Reviewer**

Klaus Schubert is emeritus professor of applied linguistics at the University of Hildesheim (Germany). He has previously held positions as a sociolinguist, a computational linguist, a project leader and a professor of language data processing and technical translation studies. His research interests include interlinguistics, translation studies and specialised communication studies.

## **Über den Rezensenten**

Klaus Schubert ist Professor für Angewandte Sprachwissenschaft der Universität Hildesheim im Ruhestand. Er war zuvor als Soziolinguist, Computerlinguist, Projektleiter und als Professor für Sprachdatenverarbeitung und Technikübersetzen tätig. Zu seinen Forschungsinteressen zählen die Interlinguistik, die Translationswissenschaft und die Fachkommunikationswissenschaft.